

Theodor Storm,

Marbordo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Marborden flugas mevo
Kaj ekkrepuskas nun;
Super malsekaj marĉoj
Sumas vespera sun'.

Griza birdar' kuretas
Ĉe l' akvo en nebul',
Kaj kuŝas kiel en songo
Surmare la insul'.

Aŭdiĝas de l' ŝlim' fermentanta
Sekretoplana son',
Soleca kriado de birdoj –
Samkiel de eon'.

Mallaŭte ekstremetas,
Ekkuŝas nun la vent';
La voĉoj super la marĉo
Aŭdeblas en la silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Meeresstrand" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-02.*

MR-025-2 / Arg-221-438 (2004-04-09 17:49:01)